

Heinrich Heine,
Surflugiloj de la kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Surflugiloj de la kanto
Al Gango vi lasu vin
Forporti de via amanto
Al plej bela lok', karulin'.

Jen kuŝas en la lunbrilo
Floranta lotus-ĝarden',
Aperas en la trankvilo
Sorĉigaj feinoj jen.

Karese la violetojn
Subridi jen aŭdas vi,
Rakontas odorajn sekretojn
La rozoj inter si.

Gazeloj alsaltas maltime,
Mallaŭte nur tra la aer'
Aŭdigas de malproksime
Susuro de l' sankta river'.

Ni volas ekkuŝi tie,
En arbareto sub palm'
Ripozi kaj am-ebrie
Songadi en nokta kalm'.

...

Heinrich Heine,
Vin kantflugile, kara

tradukita de Kálmán Kalocsay

Vin kantflugile, kara,
mi portus de tie ĉi.
Sur Ganges-bordo lokon
belegan ja scias mi.

Ruĝflora ĝarden' tie kuŝas
en lunlumita kviet',
la lotusfloroj atendas
je l' kora fratinet'.

Violoj ridetas, kisas,
rigardas el stela ĉiel',
fabelojn odorajn rozoj
flustras al si ĉe orel'.

Spionas la piaj, saĝaj
gazeloj, saltas kun baŭm',
la sankta river' lontane
susuras per sia ŝaŭm'.

Kaj tie ni por ripozo
kuŝos sub alta palm',
kaj trinkos amon, pacon
kaj songos pri fea ĉarm'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-540-1080 (2010-05-23 23:03:44)

El la „Libro de l' Kantoj“, lirika intermezo.

*Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-540-1081 (2010-05-22 15:40:11)